



Anarinko, nov-zelanda birdo



Esperanto sub la Suda Kruco

Majo-Junio 2003
Numero 63 (vol. 11, no. 3)



ISSN 1039-9380



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 63 (volumo 11, numero 3), Majo-Junio 2003

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO


Recenzo: <i>Maigret kaj la maljuna damo</i> (recenzas D. Broadribb).....	3
Recenzoj: <i>La falo de la domo Usher</i> kaj <i>Radio 3zzz: Esperanto-programo</i> (Rec. db)	4
Pliaj fotoj el la Somerkursaro 2003.....	5
Interrete	7
ILEI dankas pro helpo al Afriko (Jenny Bishop).....	8
Nekrologo: James Harwood (Margaret Chaldecott).....	9
Nekrologo: Ralph V. Morgan (Jackie Fox).....	10
For the Beginner: <i>Ĝis, da, de, po, kiel</i> (Donald Broadribb)	11
Diversaĵoj	14
Kiel batali kontraŭ la burokratoj (Anna-Liisa Heikkinen)	15
El la Libroservo; skribas la legantoj	17
Praktika teorio pri transitiveco (Marcel Leereveld)	19
Konkursetoj	22
De la Sekretario; Protokolo de la ĝenerala jarkunveno de A.E.A.	23
El la regionoj	28
Odlo Bokserp	30

ĜK estas legebla per Interreto, ĉe <http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por la venonta numero: 15 junio.



Recenzas via Redaktoro



Georges Simenon: *MAIGRET kaj la maljuna damo*. Tr. el la franca Daniel Luez. Kaliningrad: Sezonoj, 2002. 128p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷.

Jen la dua MAIGRET-romano de Simenon eldonita en Esperanto.¹ Ĉar mi neniam multe legis la MAIGRET-serion, sed multe aŭdis laŭdojn pri tiu serio, mi antaŭesperis tre distran kaj altkvalitan legaĵon...kaj mi ne seniluziĝis.

En izolita vilaĝo loĝas maljunulino kun sia servistino. Subite, unu vesperon ekmortas pro arseniko la servistino. Oni scias ke tiu servistino estis tre hipokondriema, kaj kutimis mem eltrinki la reston de medikamentoj kiujn preskribis por la maljunulino la vilaĝa kuracisto. Do evidente iu...sed kiu? kial?...celis murdi la maljunulinon. Sed la maljunulino sentis misguston de la medikamento kaj ne englutis ĝin; do la servistino glutis ĝin kaj sekve mortis...la malĝusta persono. La maljunulino, kompreneble, volas ke la murdinto troviĝu, ĉar duan fojon tiu murdemulo eble ne maltrafos ŝin. Do ŝi mem petas ke Maigret persone esploru kaj enketu por trovi la kulpulon.

Maigret ne tre plaĉas al la loka policisto, nek al la vilaĝanaro. Li tro drinkas, ŝajnas tre malagema — ĉu ni eĉ diru pigra? — eĉ malmulte interesas lin serĉi rigore, pridemandegi suspektindulojn, diskuti la krimon. Eble li ne plu meritas sian iaman renomon

kiel detektivo; eble li neniam meritis tiun renomon. Eble li estas nur maljuniĝanta ĉarlatano.

La romano disvolviĝas lante, ni ne sentas ke la aŭtoro kaŝas de ni gravajn spurojn. Kelkfoje ni ekemas oscedi; kial Maigret ne cerbumadas — kial ni mem ne cerbumadas — pri la sekretoj de la kulpulo kaj ties strebado kaŝi sin?

Ĉu povas esti ke...? Verŝajne ne, kial tiu persono farus tian agon? Do eble... Sed ne, evidente Maigret mem ne serioze pripensas tiun ideon, do ni multe eraras se ni mem supozus...

Malsimile al multaj detektivromanoj, ne ekzistas en la rakonto sekretoj kiujn private konas la detektivo, sed kiujn ne prezentas al ni mem la aŭtoro tute malkaŝe. Simenon justas al ni, kaj Maigret ne estas superhomo, kun specialaj kapabloj kaj deduktolerto. Li uzas nek mikroskopojn, nek lupeon, nek fingropremaĵojn, nek falsakuzas por mistranviligi la kulpulon. Li eĉ ne kunvenigas ĉiujn partoprenantojn en la rakonto por unu post la alia akuzi kaj diagnozi la motivojn de ĉiu laŭvice. kaj plejlaste indiki al ni la kulpulon, laŭ la stilo de Agatha Christie.

Do Simenon meritas sian propran renomon: lia detektivo simple pripensas la ĉiutagaĵojn, faras logikajn konkludojn, kaj en la fino ni konkludas ke la aŭtoro ne trompis nin, ankaŭ ni simile konkludas se ni ne estus tro hastemaj solvi la krimon, malkiel Maigret.

La traduko estas sufiĉe bona. Neni- am ni forgesas ke ni legas tradukaĵon,

1. La alia estas *Maigret hezitas*, eldonita de Sezonoj en 1999.

sed plejparte la stilo estas simpla kaj klara — fidele al la originalo. Tamen, mi opinias ke la originala esperantlingva romano *Surklifa* de Serĝo Elgo literature superas ĝin. Kompreneble, Elgo ne verkis pli ol 400 romanojn, kiel Simenon. Ĉu manpleno da majstroverkoj egalas al plurcento da tre bonaj verkoj? Mi ne emas respondi al tiu perpleksa demando. □

Edgar Allan Poe: *La falo de la domo Usher*. Tr. el la angla Edmund Grimley Evans. Kaliningrad: Sezonoj, 2002. 24p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷.

Edgar Allan Poe ne estas laŭ ĉies gusto. Liaj groteskaj hororrakontoj teruras infanojn, inspiris multajn filmojn, kaj mi mem ne multe amas ilin. *La falo de la domo Usher* estas inter liaj plej famaj kaj admirataj noveloj.

La tradukinto, Edmund Grimley Evans, estas inter la plej kompetentaj uzantoj de Esperanto en la moderna epoko. Lia traduko estas modela. Por amantoj de la verkoj de Poe, mi alte rekomendas ĉi tiun verkon.

Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato

Via redaktoro pardonpetas ke la retadreso por elŭti ĉi tiun verkon estis fuŝita en nia marta numero. La kompleta vojo estas: unue iru al www.gxangalo.com, kaj tie klaku: Ligiloj > Literaturo > Anglalingva literaturo en Esperanto > Harry Harrison > Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato.

Preskaŭrecenzo

Esperanto-programo, Radio 3zzz. Aŭskultebla per Interreto ĉe www.3zzz.com.au, lundojn je 0300 GMT.

Mi aŭskultis la programon de lundo, la 14an de aprilo. Por povi aŭskulti la programon necesas uzi Microsoft Windows, do per Macintosh ne eblas ĝin aŭdi. Per Windows 2000 kaj *Windows Media Player* mi sukcesis kapti la programon.

Estas malfacile taksi la programon, ĉar la sonkvalito de la retelsendo de 3zzz estas eksterordinare malbona. Estis kvazaŭ mi aŭskultas mallongondan stacion, aŭ misagorditan radioondon. Abundis sonperturbado, regula fadado (“ondado”), tiel ke efektive mi ne povis klare aŭdi pli ol manpleno da frazoj. Tio tre ĉagrenis min, ĉar en la programo estis longeta intervjuo kun Geraldo Mattos, kiu estas la prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj bona plumamiko mia. Lia voĉo sonis tre agrabla, ankaŭ lia parolmaniero, kiu estas tre klara, melodieca, kaj lia prononcado estas perfekta. Samon mi povas diri pri la du prezentantoj, Les kaj Chris. (Tamen min frapis ke, kvankam la prononcado de Les estas klara kaj ĝenerale tre bona, li plejofte misakcentas vortojn finiĝantajn per *-ia* kaj *-io*, tiel ke li diras “internacia” anstataŭ “internacia”).

Dum la horo estis pluraj muzikaĵoj, kantoj en Esperanto (ĉe la komenco estis esperanta versio de *Estas mi aŭstralian'*!). Ili estis bone elektitaj, kaj sendube plaĉis al tiuj kiuj povis la dissendon kontentige aŭdi.

La interretan version mi apenaŭ povas rekomendi, pro la aŭskultad-problemoj; sed la programon mem jes ja. □

Ankoraŭ el la Somerlernejo




Grazina Opulskiene, Cseh-instruistino el Litovio kun siaj gestudentoj.

De maldekstre: Myra Attwood, John Gallagher, June Cullen, Pat Palmer, Bradley Macdonald, Grazina Opulskiene, Bill Aulsebrook, Dorothy Bysouth, Sandor Horwath, June Perkins

La fotojn kontribuis
Jennifer Bishop

Marcel Leereveld, lerta gramatikisto instruista klarigas la pasivan voĉon!



Ekskurso per pramo de Melburno al Williamstown, ŝiphaveno ĉe Golfo Philip:

Matthew Maguire, Vladka Chvatalova, Dorothy Bysouth.)



Ekskurso al Williams-
town: Tempopilko-Turo
 Malantaŭe: Marianne
 Ormond, Terry Manley,
 Hazel Green, Caroline
 Turner, June Cullen,
 Les Farkas, Dorothy
 Bysouth, Bradley
 MacDonald, Karl Egger,
 Eileen Jones

Teatraĵo de Espe-
ranto-Federacio
de Viktorio: “La
bestokuracisto”:

Dorothy Bysouth
 (kliento kun kato),
Alan Bishop (kliento
 kun hundo),
Jennifer Bishop (Kli-
 ento kun kanario),
Marcel Leereveld
 (bestokuracisto)



Teatraĵo de
Esperanto-
Federacio de
Viktorio: “La
Bestokuracisto”:

Dorothy Bysouth
 (kliento kun kato)
Alan Bishop (kliento
 kun hundo)
Franciska Toubale
 (kliento kun pulo)



Interrete



• **La plej legataj Esperantolibroj:** Ĉe <http://www.esperanto.nu/eLibrejoj/> estas elŝuteblaj centoj da literaturaĵoj en Esperanto, en pdf-formato. Laŭ informoj ĉe la e-Librejo, jen kelkaj el la plej popularaj literaturaĵoj:

<i>Nombro da ekzempleroj elŝutitaj</i>	<i>Titolo:</i>
1768	<i>La eta princo</i> , de Antoine de Saint-Exupéry
1189	<i>Fabeloj I</i> de H.C. Andersen
1052	<i>Esperanta proverbaro</i> , de L.L. Zamenhof
1012	<i>Vivo de Zamenhof</i> , de Edmond Privat
983	<i>Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia</i> de L.L. Zamenhof
944	<i>Lingvaj respondoj</i> , de L.L. Zamenhof
908	<i>Paroladoj</i> , de L. L. Zamenhof
874	<i>Zamenhof</i> de Ernest Drezen
824	<i>La Aventuroj de Alico en Mirlando</i> de Lewis Caroll ¹
820	<i>La tempo-maŝino</i> de H.G. Wells
813	<i>Du malsanoj en Esperanto</i> , de H.A. de Hoog
800	<i>Fremdvortoj en Esperanto</i> , de Paul Neergaard
760	<i>La respubliko</i> de Platono ¹
725	<i>La mirinda sorĉisto de Oz</i> , de L. Frank Baum ¹

• **Kaptu vian Enigmon!** Flandra Esperanto-Ligo, FEL, ĵus eldonis la unuan numeron de la nove lanĉita revuo *Enigmo*. Ideala por tiuj kiuj ŝatas krucvortenigmojn, logigramojn, vort-

serĉadojn, kaj por tiuj kiuj ŝatas lingve ekzerci sin laŭ distra maniero.

La malfacileco de la enigmoj varias, tiel ke kaj komencantoj kaj progresintoj trovas defiojn. La revuo kostas €2.50 + afranko por unuopa numero, €9.00 por abono de 4 numeroj. Ĝi estas mendebla ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo
 Rete: admin@fel.esperanto.be
 [fonto: *ret-info*]

• **Astronomia Esperanto-Klubo** jam de pluraj jaroj okupiĝas pri la pretigado de interreta *Astronomia Esperanto-Terminaro*. La vortaro celas pritrakti la terminaron en 92 lingvoj.

Ĉe ĉiu kapvorto vi trovos mallongan difinon en Esperanto kaj tradukon al pluraj lingvoj. Eblas konsulti la vortaron surrete, aŭ elŝuti ĝin (baza teksto: proks. unu megabajto; kompleta teksto: 2,6 megabajtoj).

La vortaron oni trovas ĉe: <http://www.esperanto.org/AEK/AT/>
 [Fonto: *Ret-info*]

• **Kontraŭ unu retroŝta mesaĝo** — do senpage — vi povas peti de la aŭtoro, Ruben Feldman González, la ankoraŭ ne finitan libron *Ekstrema humuro en Esperanto*.

Ridu kun la aŭtoro dum li finas ĉi tiun majstran verkon pri:

1. Cigano kaj Princino
2. La hundo de sinjorino Bono
3. Vojaĝo al Charango
4. Kompatinda Stefano
5. Paskaj memoroj pri la dolĉa patrino
6. Moho

1. Tradukita de via redaktoro! —

7. La kolero de monaĥo
8. Metafiziko de miliĝiŝi
9. Rakontetoj hontigaj — Pastro Johano — Rekomendoletero — La luno
10. Kial klaĉulo koleris?
11. Konsiloj al dikeguloj
12. Ekster Prizono
13. La suspektema fizikisto
14. La Nigra Plago
15. Meditoj pri la medito
16. Ekzercilo — Unua Meksika Manĝo — Kiam telefoni kuraciston en Latinameriko
17. 14 rekomendoj por fraŭla sinteno en la lito
18. La Pesimisto
19. La juna najbarino de Sherlock Holmes
20. Kompilo de 11 Internaciaj Ŝercoj

La verko peteblas de:

Ruben Feldman Gonzalez

Rete: rufegon@mxl.cablemas.com

[Fonto: *Ret-info*]

• **Birdoj kun Esperanto-nomokantas por vi!** Retpaĝaro ĉe: <http://home.no.net/verdulo/no/birdsounds3.htm> prezentas Esperantajn nomojn de 109 eŭropaj birdoj kune kun surbendigo de ilia kanto en mp3-formato. La birdojn surbendigis Juhani Kyrro k.a. (vidu la retpaĝaron ĉe: www.virtual-bird.com) kaj la retpaĝon esperantigis la aŭtoro de tiu ĉi artikolo: Claude Rouget

Rete: clauderouget@start.no

[Fonto: *Ret-info*]

• **Estas ĵus lanĉita Yahoo-grupo pri tradukado.** La grupo estas forumo por profesiaj kaj neprofesiaj tradukistoj, kiuj uzas Esperanton kiel fontolingvon aux cellingvon. Tiuj, kiuj volas traduki iun dokumenton, retpaĝaron, broŝuron, artikolon, kanton,

rakonton, k.t.p. povas publikigi ĉi tie traduk- Alvokon. Tradukistoj povas pri- diskuti terminologiajn kaj aliajn lingvajn problemojn, kiujn ili renkon- tas dum siaj tradukprojektoj. Povas leviĝi ĉiaj aliaj temoj, kiuj rilatas al tradukado: tarifoj, Esperanto-literoj, retaj terminaroj, maŝina tradukado, k.t.p. Oni povas aliĝi al ĉi tiu grupo sendante malplanan mesaĝon al: tradukado-subscribe@yahoo.com

[El *Ret-info*]

ILEI DANKAS PRO HELPO AL AFRIKO

Responde al la peto kolekti monon por pagi la aliĝkoston de Sudafrikano ĉeesti la kongreson de FIPLV (federacio internacia de instruistoj de vivantaj lingvoj) en Johanesburgo, Julie 2003, ĝojigas min anonci ke kolektitas AUD100 kio pagos la kotizon de unu persono. Tio signifas ke nun partoprenos du afrikanoj kiuj prelegos kaj muntos ekspozicion pri Esperanto kaj pri Indigenaj Dialogoj.

Sekvis la bona novaĵo ke ILEI (Inter- nacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) ricevis subvencion de Esperantic Stud- ies Foundation por subteni la duan fazon de la grava projekto “Interkulturo”. Tiel aliĝis ankaŭ vicprezidanto Radojica Petrovic al la kongreso por helpi al la kolegoj kaj speciale por varbi novajn partoprenantojn al “Interkulturo”.

El malgranda semo povas kreski granda arbo! Kun bondeziroj al ĉiuj tri por efika kunlaborado okaze de FIPLV- Kongreso ni esperu ke nia kontribuo iom helpos al plua disvastigado de Es- peranto en Afriko, speciale en SudAfri- ko. Koran dankon al ĉiuj kontribuantoj!

Jennifer Bishop ILEI-FIPLV □

Nekrologo: James Harwood

2003-03-17: *Skribis Margaret Chaldecott*

Malgaja novaĵo hodiaŭ.

James Harwood mortis hieraŭ. James estis longtempa, fidela ano de la NSK-a grupo, kaj agis kiel prezidanto, kaskisto, ktp., dum multaj jaroj. Li eĉ trovis por ni taŭgan kaskontroliston. Li aĝis 84. La edzino Beryl mortis en 1960; li havis filon kaj filinon.

Notoj skribitaj ĉe la funebro de James Harwood:

El parolado de lia filino Elizabeto:

La vivo de James estis riĉa kaj malsimpla. Naskiĝis en Suda Aŭstralio 22.11.18. Kiel bebo, li estis longa kaj malgrasa.

Estis poemo pri tiu “longa malgrasa bebo” ĉe la enirejo de la preĝejo, skribita de liaj gefratoj.

Alte nervoza, li kriegis kiam la horloĝo sonoris.

La patro mortis kiam li aĝis nur dek jarojn, lasante la patrinon eduki kvar gefilojn. Kiam unu frato serĉis laborlokon, li iris bicikle malproksimen por enketi pri la fidindeco de la karaktero de la ebla mastro.

Kiam liaj fratinoj edziniĝis, li gvidis ilin al la altaro.

Lia edzino devis loĝi en flegejo, kaj li vizitis ŝin ĉiutage kaj la gefiloj iris semajnfine.

Ĉar li elkreskis sen patro, li estis ege zorgema. Li opiniis ke patroj devus ludi kun la infanoj. Li ja ludis kun la gefiloj. Ilia patrino diris, kiam ili estis junaj: Ne dolorigu la infanojn. Poste la krio estis: Ne dolorigu vian patron. Li ege fieris pri la gefiloj. Li estis neordinara patro por filino en la

kvardekoj kaj kvindekoj; li akceptis la elekton kiun Elizabeth faris pri sia kariero.

Li edukis la gefilojn pensi: per proponado, dum la vespera manĝado, problemojn solvendajn.

Nepino defiiis sian instruiston kaj citis James-on kiel arbitracianton.

Li strebis persvadi Elizabeth-on kaj Hedley-n iĝi inĝenieroj, sed konsentis ke iliaj finaj profesioj estis akcepteblaj. Li helpis multajn junulojn trovi la plej bonan laborlokon.

Li estis saĝulo. Je la lunĉotablo post dimanĉa diservo, li rakontemis — ekz. pri persa tapiŝisto kiu teksis je unu flanko de la tapiŝo, kaj la metilernanto je la alia; kiam la junulo eraris, la mastro iomete ŝanĝis la desegnon por kaŝi la eraron.

Pri la humuro de James — Li tradukis monologon pri la problemoj kiujn konstruisto renkontis kiam li iris al laborejo post severa vento. Li devis relevi brikojn al la alta parto de muro, kaj la brikoj falis sur lin, kaj li suferis vundojn, kaj iris al oficejo por peti monhelpon.

Mi forgesis la nomon de la monologinto. Sed dum iu Zamenhoffesto mi vestis min kiel brikisto kaj prezentis la paroladon, kun multaj ĝemoj. La nomo subite revenis: Peter Ustinov! □

Raportisto intervjuas viron en naturista plaĝo:

“Ĉu vi havas infanojn?”

“Jes, de la nuna, tria edzino mi havas ses. De la dua, ok; kaj de la unua, same ses.” “Do, en tiu kazo povas esti ke vi eĉ ne estas nudisto, sed vi simple ne havis tempon revestiĝi.”

[El *Naturista vivo*, numero 66, 2002]

Nekrologo Ralph V. Morgan

(1921 - 2003)

verkis Jackie Fox

Ralph V. Morgan
A.C.A. C.M.A. F.C.I.S.

Ralph passed away in March, aged 82 years. He and his wife, Daisy, lived in Palmerston North for many years, where they both taught Esperanto. They had joined the New Zealand Esperanto Association in 1958. When Ralph retired they moved to Torbay, Auckland to be near their family. Ralph continued his interest in Esperanto.

Through 1989/1990, with his accountancy experience and despite health problems, he put a lot of effort

into bringing the NZ Esperanto Association's financial books to, as he said, "a more modern system. By changing procedures a little we may make the records easier to write up, and easier to understand, and perhaps please the Members, Executive, Registrar of Incorporated Societies and anybody else".

Daisy still lives in the Retirement Village on the Hibiscus Coast, they later moved to. We send our thoughts and condolences to her and the Family. □



Por Ridigi Vin



Post kiam Francujo enkondukis eŭrojn, la frankoj alvenis al la perla pordego. Unue venis la moneroj. Vi rajtas enruliĝi, diras Sankta Petro.

Tiam venis la 20-frankaj monbiletoj. Ankaŭ ilin bonvenigis Sankta Petro.

Li kritikeme rigardis la 50- kaj 100- frankajn monbiletojn, sed permesis ankaŭ al ili eniron tra la pordego.

Al la 500-, 1000- kaj 5000-frankaj monbiletoj, Sankta Petro diris: "Mi bedaŭras, sed vi ne povas eniri. Mi neniam vidis vin en la preĝejo."

Kontribuita de Brendan Linnane [el *Tamen Plu*]

En la lunĉejo:

"Kiom kostas taso da kafo?"

"Kvindek centavojn."

"Kaj la sukero?"

"Neniom kostas, estas senpage."

"Mi volas du kilogramojn da sukero."

[El *Eventoj*]

Instruisto:

"Ĉu ne estas mirinde, ke birdoj scipovas flugi al Afriko sen mapo kaj kompaso?"

Eta knabo:

"Sed, estus ja eĉ pli mirinde, se birdoj kunportus mapon kaj kompason!" [Eventoj]

For the Beginner

Ĝis, da, de, po, kiel

These three little words can be confusing to the a student who is used to only English. Theoretically, according to the dictionary, they ought to be obvious: *ĝis* = until, up to; *da* = of (quantity); *de* = of, by, from; *po* = per (“per person”, “per household”). But in practice, there is never an absolute one-to-one equivalence between these tiny words (and some others) in Esperanto and in English, and the uninitiated reader of Esperanto soon becomes perplexed.

Ĝis: First of all, *ĝis* means “no later than,” “no further than.” “Until, up to” do more or less give this meaning in English but there are differences. For example, when you read “*Sendu vian aliĝon ĝis la 1a de marto*”, this means “Send your application *no later than* May 1st.” “*Vi devas reaboni ĝis la 31 de decembro*” means “You must resubscribe by December 31st” (i.e. no later than Dec. 31). And, of course, “*Ili venis ĝis mia domo sed ne eniris*” means “They came as far as my house, but they did not enter.”

“He didn’t get here until 6 p.m.” might be best translated as “*Li ne atingis ĉi tien antaŭ la 6a posttagmege*”, or, more clearly, “*Li ne atingis ĉi tien ĝis post la 6a ptm.*” Theoretically, there is nothing wrong with “*Li ne atingis ĉi tien ĝis la 6a ptm*”, but you might find your readers who speak some other language than English don’t quite understand what you mean.

Da: refers to a *quantity* of something; but just as in English, it may also include the container used to measure that quantity. For example, *Donu al mi tason da kafo* means not merely “Give me a cup of coffee,” but implies that you will get a cup with the coffee in it, and not have the coffee just poured onto your lap! Similarly, if you buy a packet of cigarettes, *aĉetas paketon da cigaredoj*, you expect to get the cigarettes in a wrapper, not shaken out into a bag.

Da is used whenever a quantity is intended. So *kilogramo da faruno* — “a kilo of flour”; *Litro da lakto* — “A litre of milk”; *milionoj da dolaroj* — “millions of dollars”; *ondoj da ridado* — “waves of laughter”.

De: usually refers to the origins of something, and thus also to what something refers to. So *botelo de lakto* is simply a milkbottle, maybe empty, maybe not. *Libro de poemoj* is a poetry book. *La ĉarmo de la infano* the charm of the child. Thus also *la aŭto de mia filino* is my daughter’s car. And *la kvitanco de la vendisto* is the receipt from (given out by) the salesperson. *Li venis de Germanio* — he came from Germany. *Ŝi estas membro de Amnestio Internacia* — she is a member of Amnesty International. *Kiu estas la aŭtoro de tiu libro?* — who is the author of that book? *Tiu libro estis verkita de John Gunther* — That book was written by John Gunther.

Theoretically there can be confusion, particularly when you are thinking in English and then translating into Esperanto, and don't pay attention to exactly what your Esperanto means in and of itself. Usually there is no confusion: Since *La libro de John Gunther* means "John Gunther's book", in and of itself this does not tell whether we mean a book which John Gunther owns, or one which he wrote. But we do not usually run into problems with this potential ambiguity in English, and don't usually have any more difficulties when it is in Esperanto — *la libro de John Gunther*. Mostly because we are unlikely to happen to have a book loaned to us by John Gunther, and far more likely to have a book which he wrote.

Occasionally, however, there can be confusion, in either language. In Esperanto the basic rule is that when we are dealing with passive participles (the words ending with *-ata*, *-ita*, and *-ota*), *de* refers to the person who does whatever is done. *La libro estis donacita de John Gunther* — the book was donated by John Gunther [he made the donation].

In a few other instances we might be unsure: does *la kasisto ricevis la kotizojn de la membroj* mean "the treasurer received the members' fees" or "the treasurer received the fees from the members"? If the distinction is important, which is rarely the case, it is best to write *la kasisto ricevis la kotizojn donitajn de la membroj*, or maybe ...*la kotizojn pagendajn / pagitajn de la membroj*.

Some people use the compound word *disde* to mean "from" when there is potential confusion. *La kasisto ricevis la kotizojn disde la membroj*. The word *disde* is made from *dis* ("in several directions") and *de*. The idea is that the members are scattered here and there, so literally *disde la membroj*

Po is one of the most difficult words for English speaking students of Esperanto, because we have no single English word to express its meaning. Its basic meaning is to indicate the rate at which something happens. We use various words in English in order to express this.

They received five dollars each — *Ili ricevis po kvin dolaroj*

The boats will carry five persons each — *La boatoj portos po kvin personoj*

The rooms in that hotel have two beds each — *La ĉambroj en tiu hotelo havas po du litoj*.

How much food per person should we figure on? — *Po kiom da manĝaĵoj por persono ni anticipu?*

She received two lessons at twenty dollars an hour. — *Ŝi ricevis du lecionojn po dudek dolaroj por horo*.

I will sew for ten hours every day, for twenty dollars. — *Mi kudrados po dek horoj ĉiutage por dudek dolaroj*.

I gave the children three apples each — *al la infanoj mi donis po tri pomoj*

If I read ten pages a day, I will finish the book in four days — *se mi legos en ĉiu tago po dek paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj*

Suppose we sell the books at \$24 per book... — *Supozu ke ni vendos la librojn po \$24...*

How much money will we get, if we charge \$5 a person? — *Kiom da mono ni ricevos, se ni postulos po \$5 por ĉiu persono?*

The guests drank a small glass of wine each — *la gastoj trinkis po glaseto da vino.*

Arrange them in rows of six — *Aranĝu ilin po ses en vico.*

Article writers must supply one printed copy to each of their correspondants. — *La skribantoj de artikoloj devas dissendi po unu presitan ekzempleron al siaj korespondantoj.*

Should we be using *-n* on most or all of these words that follow the word *po*? For instance: *Ili ricevis po kvin dolarojn; La boatoj portos po kvin personojn; al la infanoj mi donis po tri pomojn*, etc.? The answer is: use the *-n* or not as you prefer. If you feel it makes your meaning clearer, then use it. If you think it is more of a bother, then don't. The originator of Esperanto, L. L. Zamenhof, usually felt no need to use it with *po*, but sometimes used it (as in the last example above, *La skribantoj de artikoloj...*). Zamenhof gave the same advice for several of these little words which might or might not logically be followed by an *-n*, especially the word *kiel*.

Kiel generally means “as” in English, in the sense of “like”. This can pose some problems for English speakers. Consider:

(1) *Leonard Bernstein estis tre fama kiel la direktoro de la Nujorka Filharmonia Orkestro.* = Leonard Bernstein was very famous as conductor of the New York Philharmonic Orchestra.

(2) *Oni ankaŭ konas lin kiel gravan komponiston.* = The public also knows him as an important composer.

In the second example should we write “...*kiel grava komponisto*” or “...*kiel gravan komponiston*”? The answer, again, is that in actual practice both ways are found.

SERĈAS LABOR- POSTENON


Kontantin Lifanov, docento, doktoro pri filologio, interesigas pri laboro kiel instruisto-slavisto (libere posedas la rusan kaj slovakon, kaj ankaŭ ĉeĥan,

polan kaj malnovslavan; la anglan (nelibere) kaj iom da germana).

Ĉefe interesas Britio, Aŭstralio kaj Kanado.

Kontaktu per Esperanto-Servocentro, ĉe esperanto@email.ru. □

Pri “Magoagotago”

Oni demandis pri la aŭtoro de la tre populara verketo “La magoagotago” aperinta en la marto-aprila numero de *ESH*. Via redaktoro sensukcese strebis trovi la nomon de la aŭtoro. La verketo troveblas ĉe www.uni-leipzig.de/esperanto/texte/bibl/index.html, kiel unu el pluraj verk(et)oj disponigataj de la Saksa Esperanto-Junularo. 



POR RIDIGI VIN



Mañuel Ĝosaŭcer G'Kaĉatglzjez, verkisto de seriozaj por-Esperantaj manifestoj kaj diskursoj por enklubaj datrevenfestoj, de nun sporada kunlaboranto en Ĝangalo. Pri sia nomo di-

ru li mem — “Mi ne aŭtorizis Ĝangalon skribi mian nomon laŭ *PEN* (Plena Esperantigo de Nomoj) pro tio, ke ĝi estas tre facile legebla de iu ajn meznivela okcidentano, ĉu ne?”

[El *Humuro* ĉe Ĝangalo, 29 marto 2003]

Dezirata Korespondi

Mi estas Navin de Kathmandu, Nepalo. Mi volas amikumi kaj esperantumi. Mi volas legi de tempo al tempo. Bonvolu skribu al mi poste. Bonvolu sendi foton kaj organojn (gazetojn) se eble.

Mia hobiaj estas instruado, bildkarto, komputilo, legado, vojaĝado, bildoj. Mi dankas vin antaŭe. Navin Lal Shrestha, GPO Box 11753, Kathmandu, Nepalo.



First-Day Covers from Croatia

31/5-2/6 2002
One cover has an Esperanto postage stamp and the inscription “14a Alp-Adria Konferenco Rijeka-Kostreno”. The other has the same inscrip-

tion but two different Esperanto postage stamps. It is relatively unusual for two new Esperanto postage stamps to be issued simultaneously for the same event.

[Source: *Revuo Esperanto* marto 2003.]



Por Ridigi Vin



Kiel batali kontraŭ la burokratoj

de Anna-Liisa Heikkinen

Se vi volas konatiĝi kun burokratoj, iru eksterlanden. Hejmlande oni neniam trovas sufiĉe absurdajn situaciojn por vere senti la neceson al batalo.

Eksterlande ne estos malfacile trovi okazojn por dura batalo. Sendube vi baldaŭ trovos vin ekzemple en situacio, en kiu mankas al vi kaj la studentpruvilo kaj la restadpermeso — kaj vi ne povos havi la unuan sen la alia (aŭ la alian sen la unua). Estos por vi bonega okazo por provi la jen priskribitajn batalilojn.

La plej uzataj bataliloj estas atendado, krio, palpebrumado, kaj ploro. Kiun el ili vi uzos, dependas de vi kaj de via kontraŭulo. Estas bone atenti pri la fortekvilibro antaŭ ol komenci la batalon. Ne iru en vanan militon, certu ke vi havas venkeblon! Se estos viro kontraŭ viro, vi verŝajne elektos la unuan batalilon, se virino kontraŭ virino, la laste menciitan metodon. Mi mem kutime uzas la du lastajn. Por mi ili estis ĉiam la plej efikaj. Mi rakontu ekzemplojn.

Viro kontraŭ viro aŭ virino kontraŭ virino estas ĉiam malfacila kombino por batalo. Do prefere atendu. Se vi estas viro kaj bezonas ekz. plilongigi la validon de via laborpermeso, estas certe plej saĝe atendi ĝis ina oficisto alvenas al ĝiceto. Viaj ŝancoj multobligas tuj, kaj eĉ se vi devas unue iom atendi, vi fine gajnos tempon. Ofte vi bezonas nur rideti kaj bele rigardi la oficistinon — eble unu aŭ du vortoj ki-

uj igos ŝin senti sin bela — kaj ne plu devus esti problemoj. Vi evitos la tutan batalon per saĝa uzo de atendada metodo.

Foje, tamen, ne estas en la oficejo aliseksaj oficistoj, kaj vi devas riski batalon kontraŭ samseksa malamiko. Kutime batalo estas tiam neevitebla. Komencu per observi la grandon de la burokrato. Se vi estas multe pli malgranda ol la burokrato, vi povas provi trompi lin aŭ ŝin per krio. Por tio vi tamen bezonas riĉan kaj fluan vortaron (estas bona ideo ekzerci tion hejme). Avertu: Neniam eniru en kribatalon se via vortaro ne estas sufiĉe granda! Estos malfacile ŝanĝi la ilon mezvoje de kribatalo! Dum kribatalo, ne aŭskultu la kontraŭulon, koncentriĝu en viajn proprajn vortojn. Ĵetumu viajn brakojn, siblu kaj uzu frazojn kiajn: “Nenie alie en la tuta mondo...”, “Estas tamen nekredeble...”, kaj “Tute malprave! Laŭ internaciaj leĝoj mi rajtas havi ĉi tiun daŭrigon senpage, do silentu kaj subskribu!”. Post mallonga tempo kaj multa bruo, la burokrato laciĝos kaj por silentigi vin donos al vi tion kion vi volas.

La plej uzata ilo kontraŭ aliseksaj kontraŭuloj estas la okuloj — aŭ la okulharoj, se vi ŝminkas viajn okulharojn. Palpebrumu, palpebrumu, palpebrumu senhonte! Mi unufoje sukcesis liberigi min de impostoj je 2500 FR en Francujo per ĉi tiu metodo, do ne subtaksu ĝian potencon! Jes, certe, estas iom stranga sento sidi, rideti kaj klopodadi per siaj okuloj, sed kedu min, estas multe uzata internacia metodo, kaj oni ne devas hon-

ti uzi ĝin en batalo kontraŭ burokra-
toj. (Vi havos jen ankaŭ ŝancon al al-
dona punkto: la tuto eble finiĝos je
rendevuo kun via kontraŭulo, kaj tio
ja estus bonega afero por via lingvo-
lernado. Eble la venontan fojon vi ha-
vos sufiĉan vortaron por uzi ankaŭ la
kriilon.)

Kaj laste, mia kutima metodo, la
ploro. Kelkfoje la ploro helpas vin tuj,
alifoje nur semajnojn poste, sed min ĝi
ĉiam helpis. Mi konfesas ke mi neniam
intencis uzi la plorilon, sed iel mi
ĉiam... Do. La ploro jam taŭgis kon-
traŭ kaj viroj kaj virinoj — eble ĉar mi
estas 1,8 metra, granda blonda virino
kaj tiaj virinoj ja ne devus plori. Iel
konfuzas la kontraŭulon mia ploro.

Mia ekzempla okazo okazis dum la
pasinta semajno en Kolonja urba ofic-
ejo, kie mi provis ekhavi mian german-
an restadpermeson. Dum mia vizito mi
estis malsana kaj lacega, do ankaŭ plo-
rema. Mi vidis ke en la ofic-ejo en la
dua etaĝo de la urbodomo mia burokra-
ta kontraŭulo estos viro. Mi tuj pensis
pri la palpebroj (krii ja ne estus helpe,
ĉar mi tiom laciis ke mi nur malfacile
trovis vortojn en la germana, kaj mi eĉ
en mia mallaca stato tre malbone
krias).

Post duonhora atendo, mi finfine raj-
tis eniri la ĉambron de la malgranda
burokrato. Mi palpebrumis kiel frene-
zulino. Tute ne helpis!

“Kion vi serĉas ĉi tie? Vi devas unue
anonci vin ĉe la giĉeto en la teretaĝo”,
diris la viro strikte al mi.

Mi tute ne intencis esplori, sed mi
estis tiom laca kaj frustrita ke mi faris
(fine, tio estis belega komenco por
batalo: neniam montru, se vi intencas
plori; ĉio devas aspekti hazarda!).

“Pardonu... mi tute ne komprenas...
ho, mi estas tiel laca, mi kredas ke mi

malsanas... pardonu, pardonu...”

La konfuzita viro donis al mi ama-
son da paperoj (kiujn mi eble senplore
estus ekhavinta nur dum mia 3a-10a
vizito al lia oficejo), kaj sendis min al la
teretaĝo. Mi trankviliĝis kaj tien iris.
Ĉe la giĉeto staris nur virinoj. Mi elek-
tis mian kontraŭulinon, kaj montris al
ŝi miajn paperojn. Bedaŭrinde en unu
el la paperoj estis misskrib-aĵo... Mi
ree ekploris. La virino tute ne sciis
kion fari pri la grandegulino kiu larm-
adis malantaŭ ŝia giĉeto, do ŝi donis al
mi monaton pli da tempo por kom-
pletigi miajn dokumentojn, kaj sendis
min hejmen kun miaj paperoj kaj larm-
oj. Post unu semajno mi sentis min
sufiĉe forta por reprovi mian ŝancon
kun la burokratoj. La virino tuj rekonis
min. Estis vico ĉe la giĉeto, sed ŝi lasis
min veni unue. Miaj paperoj estis
daŭre misaj, sed certe pro timo ke mi
denove ekploros, ĉifoje tio ne gravis. Mi
ekhavis la bezonatajn dokumentojn
post kvin minutoj kaj grimpis al la dua
etaĝo, al la viro. Ankaŭ la viro tuj reko-
nis min. Li ekstaris, sed kiam mi ri-
dante (kaj palpebrumante) promesis ke
mi ne ekploros, li ridetis kaj ree sidiĝis.
Post dek minutoj mia restadpermeso
estis preta.

Do, mia konsilo al komencantaj kon-
traŭburokrataj batalantoj estas: ke vi
komencu per atendi ĝis taŭgeseksa kaj
-granda burokrate aperos, kaj poste
rapide trovu metodon kiu surprizos vi-
an kontraŭulon tiel ke li forgesos sian
propran metodon. Estas sporto en kiu
ekzerco faras majstron, do ne senespe-
ru se via unua provo ne sukcesos. Mia
ekzemplo ja montras ke viaj iloj povas
havi longdaŭrajn efikojn!

Bonajn momentojn eksterlande.

[El *Esperantolehti* aŭgusto 2002.] □

El La Libroservo:

Novaj diskaj:

Esperanto Desperado: Brokantaĵoj.
\$34.00

Persono: Sen. \$31.00

Tom Jobim en Esperanto. Brazila kolekto. \$34.90

Flavio Fonseca kaj Geraldo Matos: Simbiozo. \$36.70

Nova KD-romo:

Gaja lernado de Esperanto. \$ 27.00
Malnovaj kasedoj:

Teamo en Esperanto. \$30.50

Vinilkosmo: Kompil' vol. 1. \$25.50

Amplifiki: Esperanto ne konas landlimojn. \$29.70

Amplifiki: Ĉu ne? \$30.00

Persono: 62 minutoj. \$27

Bonvolu anonci al la Libroservo, se vi rimarkis iujn ajn problemojn pri viaj abonoj en 2003, ĉefe se vi ricevis neniun ekzempleron de revuo(j), por kiu(j) vi pagis al la Libroservo komence de la jaro. Povis okazi eraro en la Libroservo, komunikadproblemo inter nia Libroservo kaj la eldonanto, aŭ eraro ĉe la eldonanto mem. Ju pli rapide ni eltrovos la kialon, des pli rapide ni povos solvi ĉiujn problemojn! Dankon pro viaj kunlaboro kaj komprenemo.

Kontaktu: Libroservo de AEA, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016, ☎ 02 9319 4775; retpoŝte: libroservo@ans.com.au.



Skribas la Legantoj



Skribas Jonathan Moylan:

Mi ricevis la Mart-Aprilan *EN*-on kun granda ĝojo. Mi rimarkis ke mia nomo estis misliterumita — kompreneble, ĉar ĝi estas nomo kun multaj literumpovoj. Mia nomo estas literumita Jonathan Moylan, ĉar mia patrino estas franclingvonparolanta belgino, kaj oni ne povas prononci aliajn literumojn en la franca lingvo. Interese estas, ke mia nomo estas ĝuste literumita en aliaj sekcioj de la revuo!

Skribas Brendan Linnane:

On page 23 of *EN* for March-April 2003 mention was made of the warm south wind which makes the citizens of Zurich sick.

In German it is called Föhn — with an h. To the [Australian] ear it sounds like “fern”.

It can be traced back to Latin: [*ventus*] *favonius*.

The Föhn (Foehn) wind is formed in the same way as the Chinook wind in Canada.

Canadians also say that the Chinook makes them sick.

Fön (Foën), without an h, but pronounced the same, was originally a brand of hair-dryer, but has become a generic term in German-speaking countries for hair-dryer.

Zamenhof introduced the word into Esperanto as Feno, and it is included in

PV and NPIV.

The secondary meaning “hair dryer” is also included in NPIV. In Benson’s *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*,

Chinook = feno,

Foehn = feno

Hairdryer = (har)feno.

(but Benson does not offer “harsekigilo” as a possible translation)

Krause’s German-Esperanto dictionary has:

Föhn = feno

Fön = feno, [elektra] harsekigilo.

I don’t know the origin, but in current Italian, Fono is a hairdryer.

Skribas Les Farkas:

Ĉu la esperantistoj en Aŭstralio bonŝancas? Mi povas diri: jes, la aŭstralianaj esperantistoj estas bonŝancaj. La kaŭzo estas ke en Aŭstralio ni povas aŭskulti Radion 3ZZZ 92.3 FM. La elsendistoj estas volontuloj. Kelkaj elsendistoj daŭre lernas Esperanton, kaj sekvas kursaron celante fari la programon kaj viziti la radiostacion. Partopreni estas malfacile — la volontuloj uzas multaj horojn por pretigi la programojn.

Ni ricevas kritikojn — bonajn pozitivajn kaj malbonajn negativajn.

Nia malgranda grupo (ĉirkaŭ 7 personoj) uzas multan liberan tempon el sia privata vivo.

Mi petas: se iu povas partopreni en la programo, tiu estos bonvena!

La programo komenciĝas lundon je la 1a kaj daŭras ĝis la 2a.

Vi ankaŭ povas aŭskulti la programon per Interreto:

www.3zzz.com.au

Bedaŭrinde, ŝajnas ke la programo aŭdeblas nur per Windows-komputiloj, kaj nur dum la elsendohoro (kiu varias laŭ la tempozono, ekz. lunde je la 11atm en Okcidenta Aŭstralio). — [a]



POR RIDIGI VIN



Haltigas policisto rapidantan aŭtoveturiganton.

Policisto: Montru al mi vian veturigpermeson.

Aŭtisto: Tian mi ne havas. Mi perdis ĝin, ĉar mi veturis tro rapide.

Policisto: Montru do al mi la registraĵon de via aŭto.

Aŭtisto: Ĝi ne estas mia aŭto, mi ŝtelis ĝin.

Policisto: Ĉu vi ŝtelis ĝin ?

Aŭtisto: Jes, sed nun mi memoras, mi vidis registraĵon en la gantujo, kiam mi metis mian pafilon tien.

Policisto: Ĉu estas pafilo en la gantujo ?

Aŭtisto: Jes, mi metis ĝin tien post kiam mi pafmortigis la virinon kies aŭto ĝi estas. Mi metis ŝin en la kofrujon.

Policisto: Ĉu estas mortinto en la kofrujo?

Aŭtisto: Kompreneble.

Tiam la policisto telefonas, kaj baldaŭ ili estas ĉirkaŭataj de policanoj.

Policano: Montru al mi vian veturigpermeson.

Aŭtisto: Certe, jen ĝi. (Ĝi validis).

Policano: Al kiu apartenas ĉi tiu aŭto ?

Aŭtisto: Al mi, jen la registraĵo.

Policano: Malrapide malfermu la gantujon, mi volas vidi, ĉu estas pafilo en ĝi.

Aŭtisto: Certe, sed estas neniu pafilo en ĝi. (Kaj vere, neniu pafilo trov-iĝis tie).

Policano: Malfermu la kofrujon. Oni diras, ke estas mortinta virino en ĝi.

Aŭtisto: Neniu problemo. (Neniu kadavro en la kofrujo).

Policano: Mi ne komprenas. La policisto diris al mi, ke vi ne havas veturigpermeson, ke vi ŝtelis la aŭton, havas pafilon en la gantujo, kaj mortintinon en la kofrujo.

Aŭtisto: Certe, kaj mi supozas ke la mensogulo ankaŭ diris, ke mi veturis tro rapide, ĉu ne? [el *Tamen Plu*]

Praktika teorio pri transitiveco (helpe al la velingtonaj esperantistoj) de Marcel Leereveld

En Esperanto, kiel en aliaj lingvoj, ni uzas propoziciojn, kaj ties partoj, elementoj, ne funkcias kiel simplaj adicioj, sed difinas, determinas, unu la alian. Normale ĉiu sekvanta elemento determinas la antaŭan, laŭ la bildigo-ordo en la menso. Eble estas pli bona, diri ke la cirkonstanca signifo de unu parto “dependas de” la sekvanta parto. La kompleta bildo disvolviĝas en la menso laŭtempe kaj en la skribita lingvo laŭlinie. Kompreneble en etnaj lingvoj okazas disordoj, kaj eĉ en Esperanto oni kelkfoje komencas per difina aŭ negrava cirkonstanco.

La interdependecoj havas malsamajn intensojn sed la plej grava estas tiu de la t.n. Subjekto, kiu dependas de la Verbo, ĉar sen ago tiu Subjekto estas nur senviva, “morta”, bildo. Ni tre malofte komunikas tiajn senvivajn bildojn en lingvo (pli en poezio). Ĉar la Verbo(j), nomataj en Esperanto Predikato, determinas la Subjekton, ĉi lasta estas la kerno de la tuta propozicio.

Pluraj Verboj dependas de necesa alia parto por kompletiĝo. Ĉi tiu nomiĝas Objekto, kaj ne ĉiam estas menciita en la lingvo. En “Mi jam manĝis” oni forlasis la Objekton, sed ĝi estas subkomprenata, ĉar oni ne povas manĝi sen manĝaĵo. Tiuj Verboj nomiĝas Transitivaj, ĉar la ago devas “transiri” al Objekto, sen kiu, esprimita aŭ ne, la ago estas sensenca.

La resto de la elementoj de propozicio estas aŭ Komplementoj, kiuj difinas parton (Subjekton, Predikaton, Objekton, Adjekton, aŭ alian Komplementon) kaj funkcie apartenas al, for-

mas parton de, tiu propoziciparto, aŭ Adjektoj, kiuj difinas ĉiujn antaŭajn partojn kune (= Subj.o + Predikato + eble Obj.o), kaj kompletigas la bildon.

La direktoordo de la bildiĝo povas esti iomete renversita tiel, ke la Objekto de ago fariĝas la kerno, la ĉefa difinata parto de la propozicio. En tiu procedo la Verbo indikas la renversitan direkton per la alprenado ante¹ la sufikson “-ati”: “Ili konstruis nur unu domon” → “Nur unu domo konstruatis de ili”. Oni nomas tiun retroan pensdirekton la Pasiva Voĉo (kontraŭ la Aktiva Voĉo). Eĉ ĉe etnaj lingvoj apenaŭ ekzistas esceptoj en tiu procedo. Notu, ke nur la Objekto povas tiel fariĝi la nova Subjekto, kaj ke ĉi tiu procedo do povas okazi nur ĉe Transitivaj Verboj.

En etnaj lingvoj (kaj pro tio ŝajne ankaŭ en Esperanto), kaj plej multe en la angla kaj aziaj lingvoj, ĉeestas kelkaj problemoj pri la procedo.

La unua estas, ke ĉe kelkaj, sed tre malmultaj, agoj estas necesa, krom Objekto, iu Adjekto, kiun oni en etnaj lingvoj nomas Nerekta Objekto. En Esperanto tiu Adjekto normale havas la Prepozicion “al”, kaj tial estas nedistingebla de aliaj Adjektoj kun “al”. Do “Mi donos ĉekon al la butikisto”, kie la Objekto “ĉeko” devas ĉeesti ĉar oni bezonas ion por doni, sed kie ankaŭ la Adjekto (Nerekta Objekto en etnaj lingvoj) “al la butikisto” estas necesa elemento de la propozicio, ĉar se ĉeestas neniu al kiu doni, la ago estas sensenca. Oni povas ŝanĝi la fra-

1. = de. — [db]

zon en la Pasivon farante nur de la Objekto la novan Subjekton, la ĉefa parto: La ĉeko donatos de mi al la butikisto. En eŭropaj lingvoj oni povas, por emfazi, komenci la propozicion per tiu Nerekta Objekto, sed ĝia formo tiam klare montras, ke ĝi ne estas la ĉefa elemento (Subjekto): *C'est au boutiquier que je donnerai le cheque*, kaj *Dem Ladenbesitzer werde ich den Scheck geben*. Sed en la angla lingvo ankaŭ tiu Nerekta Objekto povas fariĝi la ĉefa elemento: *The shopkeeper will be given a cheque by me*. Tio povas konfuzi anglolingvajn Esperantistojn, ĉar tio en Esperanto ne eblas (*Al la butikisto donatos de mi ĉeko*). Por esti certa, ĉu iu frazparto estas Objekto au Adjekto (ĉikaze Nerekta Objekto): se oni povas meti "al" (angle: *to*) antaŭ la parto, ĝi tiam estas Adjekto/Nerekta Objekto. Se ne, ĝi estas Objekto, kaj povas uzati kiel Subjekto en la Pasiva Voĉo.

La dua problemo estas, ke en Esperanto (pli ol en etnaj lingvoj) pri pluraj agoj, Verboj, oni ne klare indikis, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj, aŭ ke ili povas esti aŭ unu aŭ la alia, laŭ la nuanco de la signifo. Decidi pri tio estas la tasko de la (ofte ne tre klera) Akademio de Esperanto. Do iuj uzas Pasivon, aliaj ne.

La tria problemo estas, ke ne estas ĉiam facila, scii ĉu iu parto estas Objekto aŭ Adjekto, ĉar kelkfoje la Adjekto estas pli grava kaj necesa ol la Objekto: *Kie ci manĝis? Mi manĝis en la ĝardeno* (kion mi manĝis, la Objekto, tute ne gravas). Tamen por decidi ĉu Verbo estas transitiva, oni ne povas diri ke "en la ĝardeno" estas la Objekto, ĉar la parto havas aŭ povas havi prepozicion aŭ estas adverbo, kio Objekto

ne povas (kun ŝajna escepto). Oni ne povas diri anstataŭ "Mi manĝis pomon" "Mi manĝis al aŭ sur aŭ por aŭ kontraŭ pomo", nek "Mi manĝis pome = en poma maniero".

La kvara problemo estas, ke en Esperanto oni rajtas (se klaras) ŝanĝi iun ajn prepozitivan adjekton (*ne Komplementon!*) en akuzativon: *Mi vojaĝis al Romo* → *Mi vojaĝis Romon*; *Mi rajdis sur ĉevalo* → *Mi rajdis ĉevalon*. Ĉar ankaŭ la Objekto havas la akuzativon, kelkfoje ne facilas scii, ĉu temas pri transitiva verbo aŭ ne, do ĉu oni povas Pasivigi: *Ni iris sur longa vojo* → *Ni iris longan vojon*; ĉu *Longa vojo iratis de ni?* Zamenhof uzis tiajn formojn, kontraŭlogike ĉar "longa vojo" signifas "sur longa vojo". Oni povas diri nur, ke "iris" estas transitiva verbo ĉar ĝi estas mallongigo (pro la Regulo pri Neceso kaj Sufiĉo) de "suriris", kiun verbon oni povas konsideri kiel transitivan. Prefere ni uzu la pli longan formon, por ne doni la falsan impreson ke (la nemallongigita) "iri" estas Transitiva Verbo. Jam Zamenhof mem sentis la danĝeron: laŭ Grabowski en *Oficiala Gazeto* de 1910: "Laŭ klarigo de la Majstro, la opinio, ke en Esp-o ĉiu verbo povas havi sencon aktivan kaj pasivan, ne estas ĝusta. La fakto estas, ke ĉiu verbo povas havi post si rektan komplementon, sed ne ŝanĝante la sencon de la verbo" (*PAG* p.243). Do ke ni devas reteni diferencon inter transitivsencaj kaj netransitivsencaj verboj. Sed la Z.'a ideo starigas 3 demandojn: 1) Ĉu transitiveco rilatas al la ideo de objekto ("rekta komplemento"), se ĉiu verbo povas havi ĝin? 2) Ĉu ekzistas du malsamaj specoj de objekto, la rekta rekta objekto kaj la elprepozitiva rekta objekto? 3) Kia objekto povas

fariĝi subjekto en la Pasiva Voĉo? Ŝajne Zamenhof komplikigis la aferon ĝis mallogiko. Verŝajne li celis, ke ĉiu verbo povas havi akuzativan adjekton; se ne, li diris sensecaĵon.

Por scii ĉu verbo estas transitiva aŭ ne, ni devas demandi al ni, ĉu ĝi povas havi Objekton aŭ ne, kaj kio estas la Objekto. Kiel ni vidis (*Mi manĝis en la ĝardeno*), ne temas pri graveco al la verbo.

Jen estas miaj tri kriterioj por decidi, ĉu io estas (rekta) Objekto, kaj por el tio konkludi, ĉu la ĉea verbo estas transitiva:

1) La frazparto ne estas la subjekto nek predikativo nek havas prepozicion.

2) Por sia plenumiĝo la koncerna ago bezonas, por ne esti sensenca, la frazparton esprimita aŭ ne.

3) La frazparto estas tiom rekte ligita al la ago, ke ĝi ne povus esprimati kun prepozicio anstataŭe. Jen kelkaj ekzemploj:

A. *Mi sendis la leteron al mia amiko*: Oni ne povus havi iun ajn prepozicion antaŭ “la letero” (je, pri, al, per, ktp.), kaj kriterioj 2) kaj 3) validas, do “la letero” estas objekto, kaj “sendi” estas transitiva verbo.

B. *Ili manĝis la tutan vesperon*: “la tuta vespero” povus havi prepozician (dum, je, en), do ne povas esti objekto, sed la ago ne povas okazi sen esprimita aŭ subkomprenata frazo (ili ne povus manĝi, se ne estus io [neesprimita] kion manĝi [kriterio 2]). Kaj ĉar kriterioj 1) kaj 2), ankaŭ validas (oni ne povas manĝi sur io aŭ je io, ktp.), la neesprimita io estas objekto kaj la verbo (manĝi) estas transitiva.

C) *Tio ŝajnas mordita kaj suferanta hundo*: La frazparto “mordita kaj

suferanta hundo” estas predikativo ĉe la verbo “ŝajnas”, kaj do ne povas esti objekto.

Ĉ) *Li promenis laŭlonge de la rivero*: “laŭlonge de la rivero” ne povas esti objekto, ĉar ĝi havas prepoziciaĵon, nek eblas imagi objekton, kiun oni povus promeni, do “promeni” estas ne-transitiva verbo.

D) *Ŝi vojaĝis Romon*: Oni povas havi prepozicion antaŭ “Romo” (al Romo), do “Romon” ne estas objekto. Krome oni ne povas imagi ion, kion oni povus vojaĝi (=kio necesas por povi vojaĝi) (laŭ kondiĉo 2); do “vojaĝi” estas ne-transitiva verbo.

E) *Mi dormis longan dormon*: Oni povas diri “per longa dormo”, do “dormi” estas netransitiva verbo (ankaŭ laŭ kondiĉo 2). Unuavide tiu provprocedo komplikas, sed post kelke da praktikado oni kutimiĝas al ĝi kaj ofte trovas facile, ĉu verbo estas transitiva aŭ ne.

Estas necesega, obei ĉi suprajn regulojn pri Transitiveco kaj pri Pasivigeblo. Same kiel ĉe aliaj proponoj pliliberigi la gramatikajn regulojn, la forlaso de la strikta obeo ante¹ tiujn regulojn kondukos al la pereco de Esperanto kiel fidinda lingvo. Unu putra pomo infektas la tutan korbon. Jam PAG avertis pri alia tia libereco en §423: “Se oni allasus ankaŭ alian vortefikon [kaj jam Zamenhaf allasis, ML], ĉio ĉi estus en danĝero, la tuta konstruaĵo [=Esperanto, ML] ekŝanceliĝus, ĉio fariĝus malcerta kaj malfirma”.

Simple: ĉiuj ekstraĵoj krom la Subjekto kaj la Predikato estas:

1^a. Objekto, sen kiu (esprimita aŭ

1. = al. —(☐)

ne) la ago estus sensenca, kaj kiu ne esprimeblas per aldono de prepozicio, kaj

2^a. Ĉiuj aliaj cirkonstancoj, esprim-eblaj *aŭ* kiel adverboj *aŭ* kiel prepozitivoj, estas Adjektoj kaj ne subjektigeblaj en Pasivo (eĉ se la frazparto estas esenca al la ago: doni ion al iu).

Same simple: Nur verboj kiuj bezonas aŭ havas Objekton (por kompletigi la signifon) estas Transitivaj kaj povas uzati en la Pasivo kaj en la Medialo. Aliaj verboj estas transitivaj (kaj povas havi Pasivon kaj Medialon) nur se ili estas reduktitaj verboj: “iri vojon” por “suriri vojon” (same kiel “blankati” kaj “blankiĝi” estas reduktoj por

“blankigati” kaj “blankigiĝi”). Tio ekskluzivigas la Modajn Helpverbojn, esence netransitivajn.

(Escepte en poezio, estas konsilinda ne uzi tiajn verbojn sen prepozicia prefiksoido, kvankam simila fenomeno montriĝas en alia kazo [ne malkonsilinda]: *Mi miris pri lia retroveno* → *Mi miris _*, *ke li retrovenis*, kaj *Mi pensis pri mia frua hejmiro* → *Mi pensis _ frue hejmiri* → *Mi pensis _*, *ke mi frue hejmiros*).

[Per ĉi tiu artikolo ni fermas la diskuton pri transitiva/netransitiva; ambaŭ partioj plene esprimis sian vidpunkton, kaj la temo komencas fariĝi multe tro teknika por ĝenerala gazeto. — [E]□

Konkurseto 1

Margaret Inglis verkis la ĉisekvan poemeton, en kiu mankas la lasta linio. Via tasko estas verki lastan linion por ĝi:

La Kato

Sub la arbo atendente
Inter herboj, bonkaŝante
Ora, blanka kolorita
Okuloj akre rigardante
Je mateno, ĉe la pordo
.....????

Sendu viajn proponojn al *ĜJK* ĉe sudakruco@sudakruco.org aŭ normalpoŝte al *ĜJK*, PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. Limdato: 10 junio.

Konkurseto 2

ĜJK serĉas rakontojn/noveletojn 500-1000vortajn. Ni preferas originalajn verkojn, sed akceptos ankaŭ tradukitajn. Por ĉiu rakonto/noveleto akceptita por presigo en *ĜJK*, ni pagos per esperantlingva libro. Sendu vian tekston al la redaktoro de *ĜJK* ĉe sudakruco@sudakruco.org, aŭ per ordinara poŝto.

De la Sekretario

La sekretario sendas pardonpetojn al ĉiuj federacioj ke li ne bone komunikis la informon pri la organizo de la kongresoj/somerkursaroj. Mi ofertas eksplikon.

En la Ĝenerala kunveno 13a Januaro 2003 Mat proponis “ke la federacioj proponu lokojn antaŭ la datlimo en marto por la 20a (2004) kaj 21a (2005) somerkursaro de AEA”. La protokolo estis sendita al *ĜK* la 1an de februaro 2003 sed pro la kvanto de raportoj ktp. laŭ mia scio la protokolo ne estas publikita. Eble en numero 62 majo-junio.

En estrara kunveno kiu okazis la 15an de januaro la unua punkto de Terry estis “ĉu ni esploru anstataŭan proponon pri kursaroj kaj kongresoj” kaj estis decidite ke ni komunikadu rete.

Mi legis en *Tamen Plu* ke “ne okazos somerkursaro en 2004 sed nur kongreso”, kaj ke “en 2005 Adelajdo okazigos ĝin”.

Laŭ mia informo la estraro jam diskutis la proponon de Kay Anderson okazigi la kongreson en “The Southport School”. Eĉ ŝi demandis “Ĉu mi daŭrigu la serĉadon aŭ ĉu alia Federacio havas pli taŭgan proponon?”.

En Tasmanio mi jam faris enketojn, kiujn la estraro nun preparolas. (Ili estas videblaj ĉe

<http://www.esperanto.org.au/Kongreso2004-5.htm>

sed bedaŭrinde la dosiero estas granda kaj en “powerpoint”-formato, tiel ke ne ĉiuj povas legi ĝin.)

Bob Felby remarkis ke Katarina Taggart jam komencis organizi kon-

greson sed mi pensas ke Jenny pravis kiam ŝi demandis “La estraro de AEA devos unue akcepti proponon, ĉu ne?”. Unu el la gravaj punktoj konsiderindaj estas ke la afero estas kombinita en 2004 kune kun NZEA kaj multe helpos se kongreso aŭ somerkursaro okazos kun regulaj flugoj el NZ.

La datlimo por decido estas marto, ĉar la unua kunveno de la 19a okazis meze de marto.

Mi proponas ke ni lasu la decidon ĝis Sudaŭstralio havos opertunon informi nin pri sia plano. □

Protokolo de la ĝenerala jarkunveno de A.E.A.

la 13 an de januaro 2003, 19:07h.

Ĉeestis 31 personoj: Joy Turvey, John Gallagher, Stephen Pitney, Hazel Green, Franciska Toubale, Colin Giles, Bernie Heinze, Bob Felby, Henry Broadbent, Betty Broadbent, Penny Vos, Alan Bishop, Jennifer Bishop, Terry Manley, Grazina Opulskiene, Atilio Orellana Rojas, Matthew Maguire, Kay Anderson, Ken Rolls, Jonathan Moylan, Alan Mendelawitz, Vladka Chvatalova, Bradley McDonald, Marcel Leereveld, Elizabeth Aulsebrook, Bill Aulsebrook, Dorothy Bysouth, Debra McCarney, Kam Lee, Sandor Horvarth, June Perkins.

Malfermo: La prezidanto, Jennifer Bishop, bonvenigis la ĉeestantojn. Ŝi transdonis korajn salutojn de Kep Enderby kaj Ron Gates.

Atilio Orellana Rojas, petite de la prezidanto de UEA, Renato Corsetti, salutis nin nome de si kaj UEA kaj ankaŭ memorigis nin pri la kampanjo de Homaj Rajtoj kaj la bezono kreskigi la

membraron de UEA. Parolis Jennifer pri la forpaso de Ralph Harry, John Moore, Brian Currie, Ruth Tumman, Chris Dean kaj Clarence Dunstan. Ni adiaŭis la aktivulojn kaj silentis dum unu minuto. Petis pardonon pro neĉeesto: Kep Enderby, Ron Gates, Alida Leereveld, Shirley Gradussov, Sandra Connors, Edna Turvey.

Protokolo de la 2002-kunveno: Ĝi aperis jam en *ĜJK* Numero 56 de marto -aprilo 2002, kaj estis disdonita al la ĉeestantoj. Marcel Leereveld petis ŝanĝon de la vorto “Ĉefa” kunveno al “Ĝenerala” kunveno. Jennifer petis ĝustan literumon de la nomo “Paul Desailly”. Marcel proponis, ke ni konsideru la protokolon jam legita. Subtenis Stephen Pitney. Akceptita: 23 jes; 1 ne; 0 sindetenis. Proponis akcepton de la protokolo Bob Felby; tion subtenis Marcel Leereveld. Unuanime akceptita.

Raportoj: La prezidanto prezentis sian raporton, kaj dankis la membrojn. Proponis akcepton Alan Mendelawitz; subtenis Bernie Heinze. Unuanime akceptita. Ĝono Gallagher prezentis la jarraporton de la sekretario. Demando de Atilio: ĉu eksterlandanoj vizitas la interretan paĝon de AEA? Ĉu indas aldoni la tekston de la manifesto de Prago en kelkaj lingvoj? Franciska Toubale diris, ke ŝi ricevis respondojn el aliaj landoj. Proponis Colin Giles akcepton. Ken Roles subtenis. Unuanime akceptita.

Raportis kasisto Steve Pitney pri la financaj aferoj. Steve disdonis la kontrolitan finanĉan raporton, kaj klarigis kelkajn punktojn per Esperanto.

Ni bezonos novan reprezentantan oficiston, ĉar Marj Ellyard volas ekŝiĝi. Marcel demandis ĉu tiu

reprezentanta oficisto devas esti en Viktorio (Ne).

Bernie Heinze diris, ke AEA devas esti Jure Registrita pro asekuro. Steve konfirmis, ke ni ja estas.

Marcel demandis ĉu la libroj en la kanbera biblioteko apartenas al AEA. (Jes).

Franciska petis ĉiujn viziti la bibliotekon kiam ili estos en Kanbero, por montri ĝian indecon al la registaro.

Jonathan Moylan demandis pri la fonduso Zamenhofa Jubileo. Jennifer kuraĝigis lin peti por sia klubo helpon per tiu fonduso.

Debra demandis pri la Idyss Einihovici “Childrens Fund”: kio okazis? AEA ne tenas monon por tiu fonduso. La familio Einihovici eble estos preta apogi taŭĝan infanon. Eble indas kontakti la filinon de Idyss en Perto se ŝi tenas respondecon.

Afrika fonduso: Jennifer klarigis ke finfine ni sendis la monon donitan por Silbernik-Esperanto-klubo en Tanzanio, Afriko. Bernie atentigis, ke la membraro ne kreskis. Vladka demandis ĉu la membraro scias pri la fondusoj. (Jes, per la adresaro.) Proponis akcepton de la raporto Marcel Leereveld kaj Penny Vos subtenis. Unuanime akceptita.

Raportoj el la 3 rubrikoj proponitaj en 2002:

Informado: raportis Ĝono, Debra kaj Stephen. Dum la kunsido en Perto estis decidite, ke nia grupo havu respondecon krei afiŝon por reklami Esperanton en Australio, kiel ankaŭ en Novzelando.

Ni decidis pri desegno kaj la rezulto estas jam havebla. Strioj estas haveblaj senkoste por membroj. AEA elpezis \$880 por la strio kaj fabrikigis

2000.

Instruado: raportis Hazel, Francis-ka, Bob, Kay kaj Penny. El "LOTE. Teaching Aids" AEA aĉetis 10 afiŝojn (\$110) Per ĉi tiu rubriko AEA pagis parton de la somerkursaraj kostoj por instruonto de Esperanto el Okcidenta Aŭstralio, kaj la koston por instruisto el Sidnejo. Demando de Marcel: ĉu AEA jam aĉetis librojn pri la reguloj por kunvenoj? (Ankoraŭ ne.) Bernie diris, ke li subtenis tian proponon de Marcel en 2002.

Eksteraj Rilatoj: raportis Jennifer por Kep Enderby kaj John Abood. Kep Enderby, Matthew Maguire and Penny Vos kreis hejmpaĝon en la indonezia lingvo. Vera Payne kaj aliaj tradukis kurson de Esperanto, kaj la kurso kaj la praga manifesto estas survoje al Ĝakarto. Ĉi tiu rubriko pagis vojaĝkoston por indiĝenino el Sudaŭstralio al la kursaro.

Raportoj de la komisiitoj: Raportis Marcel Leerveld pri la ekzamenoj en 2002. Dum la jaro sukcesis en la Baza Ekzameno ses personoj; en la Elementa Ekzameno sukcesis 1; en la Meza 3; en la Supera 1; en la Klereca 1. Oni aparte aplaudis la sukcesojn de Ronald Gates en la Klereca, kaj de Terry Manley en la Supera.

Pri la korespondkurso servo parolis Hazel Green: Dum la jaro 2002 ĝis decembro, 18 homoj aĉetis 24 perkorespondajn kursojn de AEA. La servo havas bonajn kursgvidantojn en ĉiu provinco. Ĉijare pli da homoj faris korespondkursojn en Okcidenta Aŭstralio danke al Debra McCarney, kiu informas kaj instruas. Demandoj: Atilio demandis, ĉu ni povos premii tiujn, kiuj finis kurson per kotizo al AEA. Jonathan demandis pri kursoj en

Newcastle. Bradley McDonald demandis pri la libroj por la 5 kursoj.

Pri la koresponda servo parolis Penny Vos: Penni ricevis petojn el Rusujo, Afganujo kaj Francujo por aŭstraliaj korespondantoj, kaj ligis la homojn al membroj de sia klaso.

Parolis Kay Andersen pri ILEI: Kay raportis pri instruado en Viktorio, Tasmanio, Okcidenta Aŭstralio, Suda Aŭstralio kaj Kvinlando. Atilio petis, ke ni raportu pli vasten, por ke europaj esperantistoj eksciuj pri la granda laboro kaj sukceso de Penny en Lernejo Treetops. Marcel aldonis al la raporto, ke 2 novaj lernantoj en la melburna klubo ĉeestas la somerkursaron.

Raporto pri 3ZZZ de Franciska: Teamo de ses homoj deĵoras duope por elsendi esperantan radioprogramon. Ĝi aŭdeblas viva por la melburnanoj kaj pere de komputilo je la adreso www.3zzz.com, lunde de la 13a ĝis la 14a. Por daŭrigi la elsendon, necesas en ĉiu jaro trovi 40 membrojn kiuj pagos kotizon al 3ZZZ, kaj gajni \$1000 por la jara monpeto de la komunuma radio. Oni modernigis la ekipaĵon. Kursoj estas proponitaj por plibonigi konon pri teknikajoj.

Novkastela raporto: Jonathan raportis pri nia plej nova grupo. El la 9 oficialaj membroj, 3 regule ĉeestas kunvenojn. Antaŭ 3 monatoj ili deĵoris ĉe tablo en kultura festo. Jonathan dankis pro aĵoj donitaj de Edna Turvey, Brian Currie, kaj Ralph Harry, kaj pro vizitoj de Margaret Chaldecott, kaj Bill & Betty Aulsebrook.

La redaktoro de ESK, Donald Broadribb sendis skriban raporton kiun Ĝono voĉlegis: *Esperanto sub la Suda Kruco* plu aperas akurate, ses-

foje. Ni ĝuas la kontribuadon de artikoloj sendataj de pluraj el niaj membroj, inkluzive de novaj membroj kaj novaj verkantoj. [Bv. legi la kompletan en *ĜJK*]

Post la raportoj, Jennifer deklaris la malnovan estraron senŝarĝita. Marcel proponis sin por prezidi dum elekto de nova prezidanto. Colin subtenis.

La kunveno paŭzis je 21:00h kaj rekomencis je 21:17h.

Elekttoj: Marcel petis proponojn por prezidanto. Matthew Maguire unu-anime elektatis post propono de Bernie Heinze, subtenita de Bob Felby. Post aplaŭdo, Mathew komencis prezidi.

La kunveno elektis la sekvajn al la estraro:

Vicprezidanto: Terry Manley. Alan Mendelawitz proponis, Kam Lee subtenis. 18 jesis, 0 neis, neniuj intence sindetenis.

Vicprezidanto: Jennifer Bishop. Hazel Green proponis, Marcel Leereveld subtenis. 13 jesis, 3 neis, 0 intence sindetenis. (Sandor Horvath kaj Debra McCarney malakceptis kandidatiĝon kiel vicprezidanton.)

Sekretario: John Gallagher. Marcel Leereveld proponis, Hazel Green subtenis. 15 jesis, 1 neis, 0 intence sindetenis.

Helpsekretario: Hazel Green. Jennifer Bishop proponis, Colin Giles subtenis. 17 jesis, 1 neis, 2 sindetenis.

Kasisto: Steven Pitney. Alan Bishop proponis, kaj Marcel subtenis. 18 jesis, 0 neis, 0 intence sindetenis.

Helpkasisto: Ken Rolls. Marcel Leereveld proponis, Dorothy Bysouth subtenis. 17 jesis, 0 neis, 0 intence sindetenis. (Frank Braham antaŭrifuzis kandidatiĝon kiel helpkasiston.)

Reprezentanto por federacioj: Suda Aŭstralio nomis Katerinan Taggart kiel reprezentanton.

Fermante la unuan sesion je 21.50h, la prezidanto Mateo akceptis la proponon de Sandor, subtenitan de Franciska, ke ni reunuvinu je 18.30h morgaŭ, la 14an de januaro.

Protokolo de la ĝenerala jar-kunveno de A.E.A. la 14 an de januaro 2003:

Ĉeestis 28 personoj: John Gallagher, Gaye Phillips, Kay Andersen, Bob Felby, Dave Dewar, Bill Aulsebrook, Elizabeth Aulsebrook, Paul Desailly, Henry Broadbent, Grazina Opliskiĝene, Dorothy Bysouth, Vladka Chvatalova, Atilio Orellana Rojas, Katerina Taggart, Caroline Turner, Joy Turvey, Hazel Green, Jennifer Bishop, Terry Manley, Kam Lee, Penny Vos, Alan Mendelawitz, Franciska Toubale, Sandor Horvath, Bernie Heinze, Colin Giles, Ken Rolls, Marcel Leereveld.

La prezidanto remalfermis la kunvenon je 18:47h, bonvenigis membrojn kaj vizitantojn, kaj dankis la antaŭan estraron.

Ĉefdelegito de AEA: Mateo petis volontulon por tiu ofico. La kunveno akceptis Penny'n Vos per aplaŭdo.

Fratuloj de AEA kaj honora dumviva membro: Ĝono legis leteron de Ralph Harry kun rekomendo/decido ke Ronald Gates kaj Jennifer Bishop (2000) kaj Marcel Leereveld (2002) estu nomitaj Fratuloj de AEA, kaj Trevor Steele estu Dumviva Membro de AEA.

Libroservo: Ĝono legis leteron de Sid Wolifson pri la libroservo en Sidnejo, kaj Vladka parolis pri la nuna situacio. Ŝi restos ĝis majo. Propono de Margaret Chaldecott estas, ke oni trovu personon, ne nepre en Sidnejo, kiu

ricevos la komputilon kun programaro kaj divido la taskon. Atilio diris ke ni ankaŭ povus havi homojn, kiuj estas dungitaj por esplori kaj komerci rilate al nia regiono.

Marcel proponis ke AEA dingu Vladkan ĝis majo kontraŭ \$25 ĉiuhore, meze 3 horojn semajne. Dot subtenis. 16 0 1 akceptita. Marcel proponis ke la estraro penu trovi personon ie en Australio, kiu transprenos la laboron de Vladka, dum libroj restos en Sidnejo. Bernie subtenis. 26 0 1 akceptita. Vladka avertis nin, ke eble ni faru nur semajnfinan kurson por pli bone kompreni la sistemon. Vladka klarigis, ke eblas dividi la laboron, kaj aparta persono povos prizorgi la abonojn kun aŭ sen komputilo. Marcel proponis, ke la estraro trovi iun por prizorgi abonojn. Subtenis Penny. 19 0 2 akceptita.

Materialo de LOTE-instruiloj: Laŭ skribita propono de Trish O'Connor, Ĝono proponis, ke AEA aĉetu la kompletan aron de L.O.T.E.-instruiloj je kosto inter \$1000 kaj \$1500 kaj Alan M. subtenis. Hazel Green proponis ŝanĝon al la propono: forstreku la vortojn "la kompletan" por ke ni povu elekti la plej utilajn instruilojn. Marcel Leereveld subtenis, ke ni ŝanĝu la proponon. La ŝanĝo akceptatis. 20 1 2. Diskuto kontraŭ la (ŝanĝita) propono: la kosto estas troa, kaj estus pli bone elspezi ĝin alimaniere. Almenaŭ du opinias, ke la instruiloj estas malmodernaj kaj maltaŭgaj. Diskuto: Aliaj ŝatas la instruilojn. Ilia ekzisto estas bona reklamo por Esperanto, eĉ inter LOTE-instruistoj. Volontuloj laboregis por traduki en Esperanton. Se ni ne aĉetos, LOTE Teaching Aids ne plu subtenos Esperanton. La nova pro-

pono estis akceptita 15 2 3 .

Ano de komitato A en UEA: Post klarigo de Atilio, ke la tasko reprezentati landan asocion en komitato A de UEA kutime daŭras 3 jarojn, Sandor Horvath, kun aprobo de la kunveno, konsentis resti kiel nia reprezentanto. Hazel Green estas lia eventuala anstataŭanto.

Medaliono Torr: Kay anoncis ke Penny Vos gajnis la medalionon por 2001/2002.

Lernolibroj: propono de Penny ke ni donu \$600 al la lernejo Treetops por helpi la aĉeton de la lernolibro *Ludu kun ni* por ĉiu lernanto. Debra subtenis. Akceptita. 18 0 0.

Publika oficisto: Steve anoncis, ke Hugh Malcolm en Kanbero konsentis esti nia publika oficisto. Do, nia oficiala registaro povos resti en ACT.

Ni pauzis dum dek minutoj je 21:00h. Rekonvenis 21:10h.

Kursaroj kaj kongresoj: La 20a somerkursaro — kie ĝi okazos? Prezidanto Mateo gvidis larĝan diskuton. Prezidanto de NZEA, Bradley McDonald, memorigis nin, ke kutime NZEA kaj AEA kongresas kune en ĉiu 4a jaro. La lasta kunkongreso estis en 2000. Elektoj estas: kongresi, somerkursari, kunkongresi. Novzelando aranĝus por maksimume 7 tagoj. Ekzotika loko, ekzemple Fiĝio, eblas.

Marcel proponetis: aŭ havu nur 3-4-tagan kongreson en 2004, aŭ pagu multe pli por kursaro kun profesia helpo, kaj unu eksterlanda instruisto. Eble en Darvino aŭ Tasmanio. Per levo de manoj, la plejmulto (11) montris subtenon por kursaro. Kursaro en Adelajdo eblos en 2005. Indas eksterlande reklami niajn kunvenojn. Alan B. klarigis ke AEA havas respondecon

organizi kongreson sed la LKK organizos somerkursarojn. Matthew proponis ke la federacioj proponu lokojn antaŭ datlimo en marto por la 20a (2004) kaj 21a (2005) somerkursaro de AEA.

Bradley parolis pri la Komisiono por Oceanio. Ĝi ja estas komisiono de UEA. Eble la estraro de AEA povus

nomi unu aŭ du reprezentantojn en la komisiono, kaj simile por NZEA. La komisiono povus sin turni al AEA aŭ aliaj por praktika, morala kaj financa subteno.

[Bv. legi la kompletan en *ĜJK* 62].

Mateo fermis la kunvenon je 22:21. □



El la Regionoj



Kvinslando: Semajnfino en marto—Membroj de Esperanto-Federacio de Kvinslando kunvenis dum la semajnfino 15/16 marto en “Mercy Centre”, Brisbano. En tiu antaŭa monaĥinejo apud trankvila arbaro, ni studis per ludoj, provverkado, poemoj, tradukado, interesa parolado, kantoj, kaj eĉ gramatikaj ekzercoj.

Dimanĉe okazis la jarkunveno de EFK. En la nova komitato estas prezidanto Gaye Phillips; vicprezidanto David Gould; kasisto kaj reprezentanto en estraro de AEA Kay Andersen; sekretario Hazel Green; publikiganto Tom O’Grady; redaktoro de *La Voĉo* Caroline Turner.

Kelkaj membroj deĵoros en esperanta budo dum internacia kongreso de Rotario en Brisbano dum 1 - 4 junio, kaj esploros la eblecon starigi budon dum konferenco de AFMLTA (Language Teachers’ Association) en julio.

Eblaj datoj de venontaj eventoj:

- Pikniko en Nerang (apud Ormarbordo) 8 junio 2003.
- Semajnfino de EFK 11/12 oktobro 2003
- Semajnfino de EFK 20/21 marto 2004

Esperantistoj el aliaj provincoj estos aŭ estus tre bonvenaj.

S.A: Februaraĵ “herboglobludoj” — Dimanĉon la naŭan de februaro multe da adelajdaj esperantistoj amasiĝis apud la maro por ludegoj. La tagmezo estis varma, kaj la maro blua kaj bela, kaj agrablis la ombro de la grandaj arbegoj. Helena, la ĉefo, kaj ŝia helpanto Sandor, alvenis la unuaj kaj rezervis la lokon. Poste alvenis nia plej nova esperantisto, Marianne Ormond, kun sia amiko Bryan, kune kun Eileen.

La kvino komencis varmigan ludon de la franca ludo Petanque (la itala Bocce). Iom poste aperis Kolino, kaj ĉiuj komencis la seriozan aferon, tagmezmanĝon! Kiam ni estis preskaŭ finintaj nian manĝadon, Brendan, la kuiristo, venis kun freŝe bakita pano, bone, kaj la tre speciala ĉeriza fromaĝkuko nigra. Ho! Sed antaŭ ol ni povis manĝi ĝin, ni devis havi la globludan batalon.

Nun aperis ankaŭ Katerina kaj Mike, kiuj eble flaris la fromaĝkukon! La kvar grupoj, 1e La Gillettoj: Bryan, kaj Marianne, kiuj memoris, ke Marianne deziras esti la unua indiĝena ĉampiono de la oficiala herboglobludo;

2e La Pekantoj: Kolino kaj Helena; 3e La Bonoj: Eileen kaj Brendan; kaj 4e La Gajnantoj: Katerina kaj Sandor.

Post multaj ludoj kaj multaj perfringraj kaj perungaj manoj ekaperis la ĉampionoj. La finbatalo inter la Gajnantoj kaj la Pekantoj estis malrapida,

sed preskaŭ egala, kaj...la esperantaj ĉampionoj estas la Pekantoj: Kolino kaj Helena.

Poste venis ankaŭ Libby, Arturo, kaj ilia hundo, por gratuli la ĉampionojn. Estis do bona tago por ĉiuj. Dankon,... kaj ĝis la venontjara batalo!

Helena [el *Tamen Plu*]



POR RIDIGI VIN



La pastro kaj la taksiisto

Mortis pastro kaj nun li atendas en longa vico antaŭ la Perla Pordo. Antaŭ li staras ulo surhavanta sunokulvitrojn, ruĝan ĉemizon, ledan jakon kaj laboristan pantalonon.

Alparolas lin Sankta Petro, “Mi devas scii, kiu vi estas por ke mi decidu, ĉu vi rajtas eniri aŭ ne en la Ĉielon?”

Respondas la ulo, “Mi nomiĝas Johano Smith, mi estas taksiveturigisto el Novjorko.”

Rigardas sian liston Sankta Petro. Ridetante li diras al la taksiveturigisto, “Surmetu tiun ĉi silkan robon kaj oran bastonon kaj bonestu eniri Ĉielon.”

Tiam li sin turnas al la pastro. Tiu staras rekte kaj laŭte krias, “Mi estas pastro Johano Neĝo, la pasintajn kvardek tri jarojn mi estis pastro de ‘Sankta Judaso’.”

Ree rigardas Sankta Petro sian liston. Diras li al la pastro, “Surmetu tiun ĉi kotonan robon kaj lignan bastonon, kaj estu bonvena al Ĉielo.”

“He, he, atendu iomete,” respondas la pastro. “Tiu ulo estis taksiveturigisto, kaj li ricevis silkan robon kaj oran

bastonon. Kial tiom da diskriminacio?”

Klarigas Sankta Petro, “Ĉar kiam vi predikis, oni dormis; kiam li taksiveturigis, oni preĝis.” [el *Tamen Plu*]

Multe dezirata

Virino rimarkis tre strangegan procesion sur la strato. La procesio alproksimiĝis al la tombejo.

Longan nigran ĉerkon sekvis alia longa nigra ĉerko, kaj malantaŭ la dua nigra ĉerko marŝis unu sola virino kun terura hundego.

Malantaŭ la sola virino marŝis 200 virinoj unu post la alia.

Nia virino respektate diris, “mi petas vian pardonon, sed neniam antaŭe mi vidis tian strangan funebran procesion. Kiu mortis?”

Respondis la virino: “Nu, en la unua ĉerko kuŝas mia edzo.”

“Kio en la mondo okazis al li?” demandis la alia.

Respondis la unua, “Mia hundo atakis kaj mortigis lin.”

Kaj kiu kuŝas en la dua ĉerko?”

Sekvis la respondo: “Mia bopatrino. Ŝi provis helpi mian edzon, sed la hundo atakis ankaŭ ŝin.”

“Ĉu vi permesas ke mi prunteprenu la hundon?” demandis la dua.

“Jes, iru malantaŭ la atendovicon!”

[el *Tamen Plu*]

Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de la reduktoro

Sen bomento

La presboboldo malklarigis kelkajn vortojn... (*Heroldo de Esperanto*, 1998:14, p.4)

Grasa jaro

En unu jaro ili estis la plej bona grupo en la lardo. (*Norvega Esperantisto*, 1997:1, p.17)

Pri forpasantoj nur bonon...

“...sub mia prezido SES [Svisa Esperanto-Societo] elektis lin kiel hororan membron.” (*SES informas*, 1991:1, p.31)

Kazo por Amnestio?

La 5-an de januaro en Pekino forpasis pro karceron... (*La ondo de Esperanto*, 1999:6, p.5)

Fekinda atentigo

Substerkindas ke ĉiujn kantistojn per fortepiano akompanis Ivanka Vučković. (*InfoSEL*, 1999:56-58, p.3)

La fina venko

La angla lingvo estas uzata en preskaŭ 80% el la hejmpaĝoj en Interreto. Tamen, malpli ol unu persono en la mondo parolas la anglan. (*Rio esperantista*, 1999: apr-jun, p.3)

Zorgigas zorgiga tekstprizorgo

La ĉeftemo estis ekologio. Komitato Jean-Pain ĉeestis per belega informa budo kaj Frederik Van den Brande prizorgis prizorgatan prelegon. (*Ret-Info*, 5 majo 2000)

Kanibala balo

Gunnar Fischer frandis la partoprenantojn per ĉiunokta diskejo. (*La Hirundo*, 2000:Septembro, p.8)

Kial SAT ne bezonas kotizojn

Sennacieca Asocio Tutmona kongresis... (*Heroldo de Esperanto*, 2000:10, p.20)

Ĉu aranĝo kun malmanĝo?

Jen fine nekonata, bonvomema Litovo ... (*La informilo de Esperanto-Francest*, 2000:3, p.20)

Memkritiko riĉigas

Mia Esperanto ne estas bona, sed mia kreditkarto estas bona se vi helpas min uzi ĝi. (El retmesaĝo)

Ĝi nun ne saltu for!

Bonvolu salti vian edzinon nome de mi. (Nikola Rašić, finante leteron, dato nekonata.)

Kolektis István Ertl

[Represita el *La ondo de Esperanto*, 2002:12, p.15]

Kaj laste, mi deziras konigi al vi ĉiujn nian plej novan, kaj plej junan, membron. Ŝia nomo estas *Tamu* (Tio signifas “dolĉa” en la Svahila lingvo), ŝi naskiĝis la 22an de decembro, 2002, en la Zoologia Ĝardeno de Perto en Okcidenta Aŭstralio, kaj je la kristnaska tago ŝi pezis 72,5 kilogramojn. La fiera patrino pozas kun sia filineto:



La Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Matthew Maquire*, 4 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101.

Vicprezidantoj: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. ☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH). esperanto@education.monash.edu.au. *Terry Manley*, 55 Alagalah St, Narromine NSW 2821. teren@mail.ans.com.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com.

Helpsekretario: *Hazel Green*, 44 Too-woomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. hazgreen@twmba.net

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. Pitney@Cyber-netint.net. **Helpkasisto:** *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj:

Aŭ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto de AEA.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St
Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09 579 4767.

bradley@esperanto-lingvo.org

Sekretario: *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

brianandjackie@abztrak.co.nz

Kotizoj:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6392, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937. 📠 (08) 9641 1134. E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org. Retsito: <http://sudakruco.org>. Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK*-on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: por membroj de AEA kaj NZEA, po Aŭ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA. Abonoj ekster Aŭstralazio kostas €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ' 2003 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ' 2003 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata uzante Acrobat-on.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmistoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to

D. Broadribb

PO Box 643

York WA 6302

Australia

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Vol. 11, No. 3, Majo-Junio 2003

Print Post Approved

PP631048/00005

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

**SURFACE
MAIL**